

Heinrich Heine,  
Libro de la kantoj, La reveno, I

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Mian vivon igis hela  
Dolĉa bildo per radi'  
Nun la bildo paliĝintas.  
En noktego estas mi.<sup>2</sup>

Kiam estas en malhelo,  
La infano, timas ĝi;  
Por forigi la premecon  
Laŭte kantas tiu ĉi.

Infanece, ne tre plaĉe  
Kantas mi en malhelec';  
Sed la kanto liberigis  
Min de mia kor-premec'.

*Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Die Heimkehr, I" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984.*

*Arg-714-1435 (2012-12-09 12:12:09)*

---

<sup>2</sup>aŭ:  
Mia viv', per dolĉa bildo  
Lumigita estis ĝi.  
Nun la bildo paliĝintas,  
En noktego estas mi.